# Boletín
## Fido kaj Espero

Del Grupo Esperantista Fido kaj Espero

Septiembre-Octubre

**Año 2009** **Nº 237**

**Dirección Postal:** Apartado, 119; 47080 VALLADOLID
Adherido a la Federación Española de Esperanto

## Editorial

Pasado el período vacacional, en el que los esperantistas, hemos tenido la oportunidad de practicar el idioma internacional Esperanto, asistiendo a alguno de los Congresos o Reuniones que, a lo largo y ancho de nuestro Planeta, se han celebrado, con mayor o menor asistencia, durante este verano, hemos regresado a nuestras tareas cotidianas.


El más importante y principal de todos ellos ha sido, como es lógico, el Congreso Universal de Esperanto, que ha tenido lugar en la ciudad polaca de Bialistok, cuna del iniciador de este idioma, Dr. L. L. Zamenhof y del que en el interior, os ofrecemos un reportaje, en esperanto, que nos ha sido remitido por la esperantista francesa *Liba Gabalda.*

Una vez más, hemos visto la utilidad y la necesidad de una lengua común, que no perteneciendo a nadie, es propiedad de todos, y que nos permite, en plan de igualdad lingüística, establecer contactos y trabar amistad con gente de todos los puntos de la tierra.

Desde el año 1987, año del Congreso Universal de Esperanto celebrado en Varsovia, no habíamos regresado a Polonia, y debo confesar que lo he encontrado enormemente cambiado y con más alegría, lo que, sin duda alguna, ha sido motivado por el histórico cambio sufrido por el país, en la década de los noventa.

A pesar de que ambos Congresos, se han celebrado en circunstancias distintas, entre las personalidades que formaban parte del Cómite de Honor, se encontraba el que fuera Alto Protector del Congreso de Varsovia, D-ro. Malinowski, al que en el acto inaugural se le brindó, por parte de los congresistas, un caluroso aplauso.

# 94-a UK 2009 en BJALISTOKO




Pli ol 1800 kongresanoj el 63 landoj ĝuis vere eksterordinaran kaj elstaran kongreson en la naskiĝurbo de L.L.Zamenhof en Bjalistoko. Ĝi estis elektita por omaĝi la 150-an naskiĝjubileon de la kreinto de Esperanto. Bjalistokanoj fieras pro tiu grava personeco. La tuta urbo eksciis pri nia evento. Stratoj estis ornamitaj per E-flagoj kaj pluraj afiŝoj ne povis esti ne rimarkitaj. Ankaŭ la urbanoj povis ĝui kelkajn E-aranĝojn okazantaj en la urbo kaj koncerton de Jomo kaj Kimo en la parko.

La etoso kaj entuziasmo en la kongresejo estis grandega malgraŭ kelkaj incidentoj fare de iuj vandaloj. La konstruaĵoj de la Politekniko de Bjalistoko funkciis kiel kongresejo. Apude estis konstruita grandega tendo ekipita per ekranoj. Tie okazis la plej gravaj solenaĵoj kaj eventoj,

La inaŭguran ceremonion ĉeestis diversaj politikaj kaj urbaj aŭtoritatuloj kaj la partoprenantojn bonvenigis ankaŭ la nepo de nia Majstro. Dum la paŭzo intervenis trupo da talentaj gejunuloj kantante gajajn, melodiajn kantojn. Reprezentantoj de ĉiuj nacioj bondeziris al la kongresanoj en ilia koncerna lingvo "Pacon al vi".

La Movada Foiro ĉiam pligrandiĝas kaj la asocioj sukcese prezentas al la publiko siajn agadojn kaj planojn por la estonteco. La programo estis riĉega, ĉiu devis elekti laŭ sia intereso kaj povis ĉeesti nur parton de la abunda oferto. Grandan intereson de la partoprenantoj vekis la kleriga lundo dum kiu estis pritraktitaj interesaj temoj. Fakaj asocioj havis siajn kunvenojn, estis diskutata la ĉeftemo de la kongreso: "Krei pacan ponton inter la popoloj", la estraro kaj la Centra Oficejo respondadis demandojn de la publiko, estis prezentitaj filmoj, pola lingvo eksprese, prelegoj pri Pollando, okazis lingvaj kursoj kaj la Internaciaj Ekzamenoj. Vespere ni povis observi per teleskopo stelojn. Ne mankis la ŝatata aŭkcio jam tradicie kaj sprite gvidata de Humphrey Tonkin kaj aliaj interesaj prelegoj. Ankaŭ la gejunuloj invitis nin al sia programo. La tuttagaj ekskursoj celis konatiĝon de diversaj regionoj de Pollando.

La Kongresa kuriero aperadis ĝustatempe kun diversaj novaĵoj rilate la kongreson kaj ekde la dua numero aperadis regule intervjuoj de konataj esperantistoj pri prognozo de evoluo de Esperanto ĝis post 50 jaroj. Perfekte funkciis poŝto kun speciala porokaza stampo kaj la poŝtaĵoj estis liveritaj per speciala trajno aŭ balono kun aldona stampo.

Paralele okazis muzika festivalo de kulturoj en la urba placo. Dum la semajno spekteblis multaj artaj programoj. Iuj estis dediĉitaj al la juda kulturo. Tre impresa kaj bunta estis la Nacia Vespero. Al la publiko estis amplekse prezentataj muzikaj kaj dancaj tradicioj de Pollando el diversaj tempoperiodoj. Ankaŭ la bankedo, al kiu ni ĉi-jare aliĝis por festi nian 30-jaran geedziĝon la 27-an de julio, estis bonega kaj festena.

Ĉi-foje la plej malmulte kostaj loĝejoj en studentaj ĉambroj situis plej proksime (vid-al-vide) de la kongresejo, kio kontentigis la plejmulton de la partoprenantaro.

En la urbocentro okazis pluraj E-aranĝoj en la kafejo Fama, teatraĵoj en urbaj teatroj kaj multaj el ni vizitis la kafejon Esperanto. Urbocentre troviĝas turismaj informtabuloj pri lokoj ligitaj al la historio de Esperanto, ĉefe al la Majstro kaj la Esperanto-Centro ofertas ekspozicion pri la vivo de Zamenhof.

Resume, pri la ĉi-jara UK ne eblas paroli alimaniere ol per superlativoj. Dank' al la lokaj aŭtoritatuloj, LKK-anoj kaj multaj helpantoj ni povis ĝui modelan kongreson. Dum la tuta semajno regis entuziasmo, festa etoso kaj amikaj renkontoj. Malfacilis forlasi tiun belan lokon.

Espereble la tri kubanoj partoprenintaj la ĉi-jaran kongreson inspiriĝis kaj provos aranĝi venontjare same grandiozan kongreson en Havano. Ili promesis tion...

Liba GABALDA



Músicos polacos en traje típico (foto HU)

# El Rico Folklore Polaco

Todos los pueblos y naciones del mundo tienen su propia música y folklore, que enriquece la variedad cultural del mundo y su rica diversidad. El folklore comprende no sólo los cantos y danzas, sino las manualidades, el modo de vida, la gastronomía y sus tradiciones.
Todo ello es producto y consecuencia de la herencia recibida, que se transmite de generación en generación y que la Unesco lo ha considerado como importante *"patrimonio cultural inmaterial de la Humanidad"*, que debe protegerse
Polonia, nación rica en cultura posee, a su vez, un folklore variado a lo largo de su geografía, fruto de su herencia cultural y mezcla de culturas
Lo más conocido de ello son las *polonesas* y las *mazurcas*, conocidas en todo el mundo gracias sobre todo al genio de **Chopin**, músico nacido en Polonia y cuyas obras, sobre todo las Polonesas se inspiran en el folklore campesino polaco. Las polonesas pasaron de ser una danza de los campesinos de la región de **Mazovia** , a ser la preferida y más bailada en las cortes europeas, y las mazurcas son una viva danza que actualmente perdura no solamente en los pueblos de Polonia, sino también en numerosas obras de música clásica, de Chopin y otros compositores.
Por su atuendo y vistosidad destaca el folklore de los montes **Tatra**, con sus casas construidas de madera y su bella música. Al norte de Varsovia, en la región de **Kashubia**, en Pomerania, también existen ricas costumbres como su bella cerámica local o sus casas de madera pintadas en blanco y negro. En la zona que rodea **Cracovia**, la variedad es grande en todos los sentidos: fabricación a mano de encajes, en la zona de los **Beskidy**, al suroeste de Cracovia, en las ciudades de Koniaków e Istebna, especialmente. En la llamada *"Región Menor"* (Malopolska) cuya capital es Cracovia, en la aldea de **Zalipie** las casas se decoran con flores multicolores pintadas sobre las paredes externas. Cada año organizan un concurso de decoración, no solamente de sus casas, sino de pozos de agua, casetas para perros etc.
Nosotros tuvimos ocasión, durante nuestra visita a Polonia, de ir en balsa por el río comenzando en Pieniny, en Dunaj, atravesando el Parque Nacional Pieninski, donde yendo en la balsa veíamos a un lado la ribera de Eslovaquia y al otro la de Polonia. A esa zona pertenece el folklore musical que aparece en la foto que veis. Cerca de allí se encuentra la famosa ciudad montañosa **Zakopane**, que nos deslumbró por su belleza y rico folklore de todo tipo (gastronomía, casas, vegetación etc).
Un folklore muy específico encontramos en **Kurpie**, donde la especialidad son los recortes de papel multicolores con los que decoran especialmente los ramos de Pascua en Semana Santa o en las procesiones del Corpus Cristi, y que tienen una rica gastronomía , entre la que destaca su miel y el licor de miel.
Durante nuestra estancia en el Congreso Universal de Esperanto, tuvimos ocasión de escuchar conferencias sobre la música polaca y oir diversas interpretaciones de música y danzas polacas, especialmente de la zona de **Podlahia**, que es la región a la que pertenece la ciudad de Bialistok, en el norte de Polonia.

M.R.Urueña

# Tra la Mondo

**Premio Deguchi al Vinilkosmo**



La muzika eldonejo Vinilkosmo, starigita de EUROKKA, ĉi-jare ricevis la premion Onisaburo Deguchi, foje nomatan "la esperantista pacpremio". La premion oni aljuĝas pro agado, kiu antaŭenigas internacian amikecon kaj pacon. Laŭ la estraro de UEA, Vinilkosmo laboras tiudirekte per muzikaj rimedoj. (el Libera Folio)

Blazono de Venezuelo



**Prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio mortis en akcidento**


La 26-an de augusto je la 22-a horo forpasis pro trafika akcidento en Karakaso la konata lingvisto, aktivulo por indiĝenaj lingvoj kaj esperantisto Jorge Mosonyi, prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio.

Jorge Carlos Mosonyi naskiĝis en Hungario en 7-a de februaro 1947. Li transloĝiĝis al Venezuelo kiel infaneto.

Esperanton li lernis aŭtodidakte en 1973, kaj de tiam li estis membro de Venezuela Esperanto-Asocio. Li partoprenis plurfoje en prelegoj

## U K 2011 en Kopenhago

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2011 okazos en la ĉefurbo de Danio, Kopenhago. Tiun decidon de la estraro de UEA anoncis ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak sabate matene en la solena fermo de la Universala Kongreso en Bjalistoko. Dum la solena fermo ĉeestis la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, kaj li estis vokita al la podio por ankoraŭfoje ricevi dankojn pro la granda helpo de la urbestraro al la aranĝado de la kongreso. Tute aparte la estraro de UEA dankis lin pro la starigo de la nova, impona Zamenhof-centro (el Libera Folio)



La marvirineto, simbolo de la urbo

## Japana esperantistino en Valladolid

Dum kelkaj tagoj de la monato aŭgusto, turismcele, vizitis Valladolid, la japana esperantistino, Etsuko Nakazawa. Membroj de la Grupo Fido kaj Espero de Valladolid, akompanis ŝin, kun la celo montri la plej allogajn monumentojn el la urbo, inter ili la Universitato kaj la Katedralo. Krome, s-ano Pedro Garrote, per sia aŭtomobilo kondukis ŝin al vilaĝoj de la Valadolida provinco kiel Tordesillas, Rioseco, Urueña, k.t.p.

# Humoro

## Vaya vista

Entra una señora a la carnicería y dice:
Deme esa cabeza de cerdo de allí.
Y contesta el carnicero:
Perdone señora, pero eso es un espejo





## Dando la nota

Era un músico tan lento, que cuando se desmayaba no volvía en SI, volvía en LA sostenido

## Menudo angelito

El niño a su papá:
¡Papá, papá, vinieron a preguntar si aquí vendían un burro!
¿Y qué les dijiste, hijo?
Que no estabas.




## Scivolema Infano



Scivolema knabeto demandas sian patron, kiu ĝuste lavas la telerojn:
Paaaĉjo, kiu estas bigamiulo?
-- Bigamiulo, ĉu? Nu li estas tiu ulo, kiu devas lavi telerojn duoble pli ol mi.

En iu societo oni parolis pri la unika kolekto de torturiloj el diversaj epokoj kaj mondpartoj, posedataj de iu nobelo. En la debaton enmiksiĝis ankau Verdi:
- Mi estas preta veti kun vi, ke en lia riĉa kolekto mankas ĝuste la plej terura torturilo.
Kiam la societo instigadis lin malkaŝi, pri kiu ilo temas, Verdi respondis:
- Ja ĝi estas piano!

## Anekdoto pri Verdi



# RESOLUCIÓN DEL 94 CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Durante la clausura del Congreso Universal de Esperanto, celebrado en Bialistok, fue leída una Resolución, en el que, entre otras cosas se dice: "Mediante la lengua internacional Esperanto, Zamenhof creó un instrumento eficaz de comunicación internacional, bajo una base neutral, sin favorecer a un pueblo sobre otro, ni a una lengua sobre otra" y en otro párrafo se añade: " Haciéndolo asi, Zamenhof reconoció que el uso de una lengua neutral, en las relaciones internacionales, ayudaría a conservar las lenguas locales y regionales, así como su identidad cultural". El texto completo en Esperanto se puede leer en www.esperanto.org, así como en la página de la Federación Española de Esperanto, www.esperanto.es.

Periódico

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
47080 VALLADOLID